

CxEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio sendata al cxiuj rete atingeblaj membroj de CxEA sed ankaux al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ilin, sufixxas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. Universala kongreso de Esperanto en Roterdamo 2008
2. Kristana kongreso en la hotelo Esperanto (Pribylina, SK)
3. Kolokvo pri planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj
4. Kelkaj interesaj interretaj ligiloj
5. Esperanto-kalendaro
6. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (oficiala organo de CxEJ redaktata de Marek Blahuš)

1. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN ROTERDAMO 2008

La venonta UK okazos en Roterdamo 2008-07-19/26. Atentu, ke la unua plej favora aligxperiodo dauxras nur gxis la fino de 2007, por tiuj, kiuj volas pagi per Kĉ al la kongresa peranto por Cxehxio ecx gxis la 27-a de decembro. Pli

poste la kongreskotizoj senteble altigxos. Aligxilojn kaj pliajn informojn vi ricevos cxe chrdle@kava-pech.cz.

Estas ebleco aligxi al la bus-karavano al la Roterdama UK, la prezo estas 14.000 CZK, pli malkaraj eblecoj bedauxrinde ne ekzistas (konfirmite de Josef Hron, kiu klopodis organizi vojaĝxon pli malkare). Sed la bus-karavano povos esti arangxita nur se ni sukcesos pleniĝi la buson - alie la vojaĝxkostoĵ kompreneble levigxus. Ni do petas cxiujn interesatojn pri FRUA ALIGXO al mirka.tomeckova@seznam.cz

2. KRISTANA KONGRESO EN LA HOTELO ESPERANTO EN PRIBYLINA (SK)

KRISTANA KONGRESO (la 58-a kongreso de KELI) okazos 28. 7. -

4. 8. 2008 en hotelo ESPERANTO en Pribylina, Slovakio. Atentu, ke ankaux por cxi tiu kongreso la unua, plej favora kotizperiodo finigxas fine de decembro 2007. Pliaj informoj kaj alighiloj: Pavel Polnický, cea.polnický@quick.cz

3. KOLOKVO PRI PLANLINGVAJ BIBLIOTEKOJ KAJ ARKIVOJ

Sub gvido de Herbert Mayer, la direktoro de la Kolekto de Planlingvoj en la Aauxstria Nacia Biblioteko okazis la 19-an kaj la 20-an de oktobro 2007 Kolokvo pri planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj. Partoprenis inter dudek gxis tridek personoj cxe entute 11 prelegoj.

Oni pritraktis profesie prilaboratajn bibliotekojn kiel en Vieno kaj Aalen, amatorajn bibliotekojn en Cxehxio kaj Bulgario, esploradon de la movada

pasinteco ekde volapuko, ciferigadon de materialoj tekstaj, bildaj kaj sonaj, problemojn de konservado de sonmaterialoj cxe niaj radioj k.s. La prelegaro estas eldonota. El Cxehxio aktive partoprenis Miroslav Malovec malovec@volny.cz a Marek Blahuš cxea@blahus.cz.

4. KELKAJ INTERESAJ INTERRETAJ LIGILOJ:

Tre interesa galerio pri la vivo de nia majstro L.L.Zamenhof troveblas cxe: <http://miresperanto.narod.ru/galerio-zamenhofa.html>

La parolado de la tiama prezidanto Renato Corsetti okaze de la 92a Uk en Yokohamo: <http://video.google.com/videoplay?docid=-6101963741396804875>
La videon produktis Narita Yosiko

Aparte interesa nova video de Claude Piron kun cxehxaj subtekstoj, sub la nomo "Jazyková výzva: Tváří v tvář realitě", spekteblas enrete cxe adreso <http://tinyurl.com/2f3n7n> Por atingi neesperantistan publikaon gxi estas en la angla, tamen pledas por Esperanto.

Esperanta rondeto Mnichovo Hradiště + Mladá Boleslav ekspoziciis sur la retadreso <http://www.mlboleslav.cz/esperanto> novan version de pagxoj. Nombro de artikoloj dauxre plialtigxos kaj cxehxe, kaj esperante. Certe imitinda ekzemplo. Gratulon!

Kaj cxu vi volas spekti filmojn en Esperanto? Tiukaze jen la ligilo al la amatoraj filmoj diversnivelaĵoj: http://www.youtube.com/results?search_query=ESperanto&search=Search , aux ekzistas ankaux alia interesa retpagxo <http://farbskatol.net>! Temas pri datumbazo de rete rigardeblaj Esperanto-filmetoj, eblas sercxado laux diversaj kategorioj.

Kaj se volas auxdi vocxojn de niaj karmemoraj kaj kelkaj nuntempaj esperantistoj, vizitu rememorigajn retejojn de "Verda Stacio" kaj "Verda Cxaro de Julio Baghy", kie aperis konservitaj sonregistraĵoj (kvankam faritaj post 1960):
http://www.medy.cz/Brno-Esperanto/Verda_stacio/Verda.htm
http://www.medy.cz/Brno-Esperanto/Verda_cxaro/VC-Verda_cxaro.htm

5. KALENDARO de E-ARANGxOJ EN CxEHxIO kaj ORGANIZATAJ EL CxEHxIO

La lauxeble kompleta kalendaro aperis en la retkomunikoj 3/2007. Cxi tie ni rememorigas nur la plej proksimajn arangxojn, sed en la lastaj cxi-jaraj retkomuniukoj ni volas denove aperigi la KOMPLETAN kalendaron por la jaro 2008. Tamen, gxi povos esti vere kompleta nur se ni scios ankaux pri via preparata arangxo. Do, bv. anonci gxin al la retadreso chrdle@kava-pech.cz indikante minimume la nomon de la arangxo, la daton, la lokon kaj la retadreson, kie eblas ricevi pli detalajn informojn. Antauxdankon por la kunlaboremo al cxiuj organizantoj de E-arangxoj en Cxehxio.

Nuligo: mi devas anonci, ke la preparata flugkaravano al Hindio kaj Nepalo lige al la 3-a Asia E-kongresos ne okazos, cxar aligxis nesuficxa nombro de partoprenontoj. Cxiuj antauxaligxintoj jam estas informitaj. Kaj jen la du

plej proksimaj arangxoj, okazontaj ankoraux cxi-jare:

2007-11-30/12-02: La 19-a IFK (Internacia Kultura Festivalo) en Ústí nad Labem. Inf.: m.smycka@seznam.cz

2007-12-15: ANKRO, Antauxkristnaska Renkontigxo en Písek. Tradicia Zamenhofa kaj Kristnaska rita programo kun tombolo. Inf.: esperanto.pisek@seznam.cz

6. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (OFICIALA ORGANO DE CxEJ redaktata de Marek Blahuš)

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) renkontigxis 26-28-an de oktobro en Světlá nad Sázavou. Cxeestis 13 esperantistoj, inkluzive de gastoj el Slovakio, Aŭstrio kaj Brazilo. Dum gxi - la 27-an de oktobro 2007 - okazis la 3-a gxenerala asembleo, kiu elektis novan estraron kaj aprobis jarraporton kaj agadplanon. Nova estraro de CxEJ konsistas el kvinkapa komitato (prezidanto Marek BLAHUŠ, vicprezidanto Daniel MRÁZEK, kasistino Dagmar CHVÁTALOVÁ, kaj du ceteraj membroj Miroslav HRUŠKA kaj Aleš TOMEČEK) kaj trikapa revizia komisiono (Tomáš BŘICHÁČEK, Petr Adam DOHNÁLEK kaj Jan URBÁNEK). Al eksigxinta kasistino Aneta MURSWIEKOVÁ ni dankas pro kunlaboro.

Septembron markis krom rekomencigxo de studado ankaux raportado pri someraj arangxoj. Okazis pluraj prelegoj pri la juni-julia cxehxoslovaka vojaĝxo al Ukrainio (por ekstera publiko en Brna e-klubo, dum InPaSem, en gimnazio Uherské Hradiště), raporto legeblas rete. Du CxEJ-anoj kontribuis al CxEA-konferenco en Polička, samtempe aliaj du cxeestis arangxon ArKonEs en pola Poznanio. Dum InPaSem en Dobřichovice Marek BLAHUŠ helpis kiel instruisto kaj Dan MRÁZEK kiel gvidanto tra Prago. Okaze de la eŭropa tago de lingvoj ili komune prezentis esperanton en gimnazio Praha-Modřany. CxEJ reprezentigxis ankaux dum EMAKARO en Bratislavo kaj arangxo de E-mentál.

Oktobre la CxEJ-klubo en Brno inauxguris novan ZEO-n apud Špilberk. La 16-an de oktobro kadre de programo "Dopoledne s Leonardem" elsendis Cxehxa radio ok-minutan intervjuon pri esperanto-slango kun slovako Martin MINICH, kreitan de Dan MRÁZEK. La artikolo "Esperanto" en cxehxlingva Vikipedio (<http://tinyurl.com/22k3gu>) honorigxis "bona artikolo", kunlabore de tri junaj vikipediistoj. Dáša CHVÁTALOVÁ cxeestis IFEF-konferencon en Liberec. Marek BLAHUŠ kaj Miroslav MALOVEC prelegis dum kolokvo pri esperanto-bibliotekoj en Vieno kaj renkontis membrojn de AEJ. Menciato pri Esperanto far Marek BLAHUŠ aperis en elsendo "Křesťanský magazín" de Cxehxa Televido la 4-an de novembro ekde 14:35.

La programo (cxehxlingva) nun spekteblas ankaux rete:

<http://tinyurl.com/2ceg5o> (por malrapida retkonekto)

<http://tinyurl.com/2cwydd> (por rapida retkonekto)

Pasintfoje neaperinta eldono de "CxEJ aktivas" kaj ceteraj aktualajxoj pri cxehxa junularo troveblas cxe

<http://cej.esperanto.cz/>

